

# ESPERANTO

## TRIUMFANTA

**Eldonantaro:**  
*Dr. Leono Zamenhof*, Warszawa (Varsovio)  
*W. M. Page*, advokato, Edinburgh  
*Ernest Archdeacon*, Paris  
*J. Gill Norton*, komercisto, Barcelona  
*H. Fischer*, grandindustriisto, București  
*Teo Jung*, Horrem b. Köln  
*Frans Schoofs*, Antwerpen (Anvers)  
*P. v. Medem*, bank- kaj fabrikdirektoro, Kaunas.

**Tarifon**  
 vidu sur speciala folio, kiu estas aldonata al ĉiu specimeno kaj unua numero de nova abono.

**Oficiala Organo de la XV-a Universala Kongreso de Esperanto. — Publikigilo de multaj gravaj Esperantistaj organizaĵoj.**  
**Tendenco: Neŭtrala - Tolerema - Esperantista - Internacia - Universala.**  
**Aperas semajne. — Senpagaj aldonoj: „Internacia Komercio“ (praktika) kaj monata „Revuo“ (literatura, popolsciencia).**

**Administrado:**  
 (sufiĉa adreso)  
 Esperanto Triumfonta,  
 Horrem bei Köln, Germanj.

**Redaktistaro:**  
 Ĉefredaktisto: *Teo Jung*.  
 Kunredaktistoj: *M. Butin*, L. K.  
 Literatura redaktisto: *Zanon*.

**Kunlaborantoj**  
 inter la Esperantistaro de la tutmondo.  
 Manuskriptojn oni skribu nur sur unu flanko de la papero.

**Tarifon**  
 vidu sur speciala folio, kiu estas aldonata al ĉiu specimeno kaj unua numero de nova abono.

**Antwerpen-Anvers, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem b. Köln, Kaunas-Kowno, Paris, Warszawa**

## Kongresa Barometro de la Dekkvina montras: 3400. Rapidu aliĝi, por ke la kvara milo baldaŭ kompletigu!

### Al la gloro de Pasteur.

Pasteur estis eminenta, homama genulo. En la momento, kiam Francujo solene festas la centjaran datrevenon de lia naskiĝo, ni deziras, pro memorhonorado al li, priskribi en ET mallongan skizon de lia vivo kaj laboro. Li, same kiel Zamenhof, sian tutan vivon dediĉis al scienco kaj homaro, kaj liaj bonfaroj transpasas ĉiun nacian limon. Ankaŭ kiel nia Majstro, li trovis admirindan edzinon, kiu favoris al la scienculo la taŭgan vivon.

Louis Pasteur naskiĝis en Dôle (juraso) la 27-an de decembro 1822 kaj pasigis la junecajn jarojn en urbeto Arbois, kie la patro posedis tanĉejon. Post klasikaj studoj en Besançon kaj Paris, li estis akceptata en 1845 en la Superan Lernejon por profesorado (Ecole normale supérieure), kie li pasiĝis por la laboratoraj studoj, ĝis venis la tempo por iri eksteren kiel profesoro en liceon. Sed liaj lernomastroj protestis, ke estus grava perdo rompi lian promesdonan komencan de sciencaj esploroj, kaj do li ricevis permeson trankvile daŭrigi siajn laborojn.


La gravaj okazaĵoj de 1848 entuziasmigis Pasteur por la respubliko kaj forigis lin momente de la scienco; sed ĝin li tro ŝatis por longe resti for, kaj revenis baldaŭ al siaj traserĉoj. Ĉe tiu epoko li ekiris atenton de la sciencularo, solvante la problemon de la kristala strukturo, kiun plej eminentaj kemistoj ne sukcesis malkovri. Poste (1849) — li estis 26-jara — li fariĝis profesoro en Universitato de Strasbourg, kie li edziĝis kun unu el la filinoj de la tiea rektoro, kaj en Universitato de Lille. Jam de tiu tempo li faris la seninterrompan vicon de esploroj kaj eltrovoj, kiuj famigis lian nomon. En 1857 li revenis en la Superan Lernejon de Paris kiel direktanto por la sciencaj studoj, kaj de nun li daŭre kaj modeste pasigis tie sian karieron en la domo, kiu ĉiam restis al li tiel kara. Lia nomo rapide fariĝis konata, kaj li kronis fine sian verkon per la eltrovo de la kontraŭrabia vakcinado, kaj la kreado de la tutmonde fama Instituto Pasteur, en kiu indaj disĉiploj disvolvadas senĉese la fekundajn instruojn de la forpasinta majstro.

La eltrovoj de Pasteur. El lia verko ni devas citi antaŭ ĉio la unuajn laborojn pri kristaloj kaj pri fermentado. Li akiras konkludon, ke fermentado estas okazigita de ĝermoj, kaj montras

rimedon por reguligi ĝin kaj alkonduki al taŭga celo. Sekvas baldaŭ la alkohola fermentado, el kiu rezultas glicerino, deirpunkto de grava nuna industrio.

Jen estas la mikroboj kaj la fama interdiskutado pri spontana generado. Li pravas, ke fluidaĵo per varmo steriligita enhavas nenion vivan, sed la ĝermoj venas nur de aero. Ĉi tiu principo kondiĉas kaj direktas ĉiujn postajn esplorojn de

rabion. Longe, obstinege li studadis kaj eksperimentadis, kiam subite per ekfulmo de genio li ekkonas, ke per inokulado de mikroboj laŭ difinita maniero kulturitaj, la inokulita besto fariĝas imuna kontraŭ la samspecaj normale aktivaj mikroboj. Tio estis la eltrovo de vakcinado. — En 1885, la unuen fojon, li ekprovas sian kontraŭrabian vakcinon al homo, la juna alzacano Josefo Meister kaj forrabas lin de la morto malgraŭ 14



★  
**XIV-a Brita Kongreso de Esperanto en Bournemouth.**  
 La kongresanaro ĉe komuna tagmanĝo.  
 ★

Pasteur. Li studas sinsekve la malsanojn de vino, de silk-raŭpo, de biero, kaj ĉiam finvenkas ilin.

Pasteur intertempe fariĝis membro de Franca Medicina Akademio (1873). La laboroj pri mikroboj enkondukas lin en tiun novan fakon: li pruvmontras, ke la infektaj malsanojn kaŭzas nur la ĝermoj dissemitaj en aero, akvo aŭ grundo. Bena teorio! Liaj metodoj de asepsa flegado kaj pansado, uzataj unue de la granda angla kirurgo Lister, savas mile kaj mile la vivojn en la tuta mondo kaj ebligas miraklajn progresojn de la kirurgio.

Ni venas fine al la du plej gravaj eltrovoj de Pasteur: koncerne karbunklon de la brutaroj kaj

vundoj. — Tio estis triumfo spite de kabalo, envidio kaj nescio.

Sed Pasteur, ĉe kulmino de gloro, ne plu estis longe vivonta. Li mortis 73-jara, lacegigita pro laboro, en 1895, en Verneuil l'Étang, kie li estis retirinta sin de kelkaj monatoj.

Pasteur per sia modesta, labora, altespirita vivo, ĉiam turnita al suferoj de homaro, estas unu el la plej puraj figuroj en la scienco. Ni salutu lian memoron.

Laŭ „Est Républicain“ aranĝis A. Esselin.

### Letero el London.

En nia lando en la nuna tempo oni babildas pri du ĉefaj aferoj — la nova ministraro kaj la lastatempa kontraŭleĝa ellandigo de kelkaj irlandaj patriotoj laŭ ordono de s-o Bridgeman, la Ŝtata Sekretario por Enlandaj Aferoj.

S-o Baldwin, la nova ĉefministro, estas loma enigmo, ĉar lia publika kariero estas nur mallonga. Tamen li estas bonvenita de la brita publiko pro tio, ke li estas komerculo kaj li estas pli taŭga anstataŭulo de Bonar Law ol Lordo Curzon, ĉar la lasta estas unu el la plej energiaj militaristoj; ankaŭ estas la populara opinio ke estas preferinde ke ĉefministro ne estu membro de la Cambro de Nobeloj. Oni diras ke dum la milito s-o Baldwin estis „premata de la konscio ke li ne povas fari la samajn aferojn por sia lando, kiujn la ĝeunuloj de la nacio tiel ga e faras“. Tial li taksigis sian riĉaĵon kaj kontribuis unu kvaronon de la takso al la fisko kiel propravalon oferon. Jen trafa argumento favore al la Kapitula Kolektado (angle: Capital Levy), kaj la ĉiutaga organo de la laborista partio citas tiun faktan en ĉefartikolo. Komprenible oni scias ke s-o Bonar Law ne maprovis la ideon de Kapitula Kolektado, kaj li mokis la ideon ke ĝi estas konfiskado. Nur tempo montras la kapablecojn kaj povojn de la nova ĉefministro, kiu almenaŭ komencas sian laboron en sia nova rolo subtenata de la bonvolo kaj preĝoj por sukceso de la tuta brita nacio, de ĉiu politika partio.

La 27-an de majo 1679, la Habeas Corpus Akto leĝiĝis. Ĝi difinis la principon, kiu lastatempe tre trafe pravigis, ke neniu brita regato povas esti tenata en malliberejo ne estante juĝata. La Ŝtata Sekretario por Internaj Aferoj kontraŭleĝe ellandigis kelkajn dekojn da britaj regatoj kaj la Leĝo Oficiraj de la Reĝo decidis ke lia ago estis kontraŭleĝa. Tamen por liberigi la Ŝtatan Sekretaron de la konsekvencoj de liaj kontraŭleĝaj agoj, oni enkondukos en la Cambron de Depuŝitoj Leĝprojekcion de Kompenso, por kiu li povos estonte ignori la liberecon de la regato. Komprenible tiun projekton energie kontraŭstaros la laborista kaj liberala partioj.

Sendube liaj aferoj donas forton al la laborista partio kaj estas tre evidente ke en la proksima estonto tiu partio fariĝos la plej potenca. Jam

### La virnumido.

De Paul Busson\*).

Mi ne scias, ĉu la akrega voĉo de virnumido efektive malhelpas la proksimiĝon de ratoj al la bieno. Ne estus malkompreneble, ĉar la sonoj, kiujn li eligas, tre similas al la agrabl'a grincado de fajlata vitro.

Do iun belan tagon la virnumido estis ĉi tie. Li ne estis bela, sed tre distinga. Super fabele perlorigita, gustoplene punklita vestaĵo sidis maldika, vivkonsumita koleto, blanklakita kapo kun du flumruĝaj vangpendaĵoj kaj unu samkolora, rigide elstaranta kresto. Ĉi tiu stranga virkoko aspektis, alie oni ne povas esprimi sin, kvazaŭ ĉiutage freŝrazita kaj belfrizita, kaj spontane oni serĉis la gladofaldon sur liaj tro graciaj kruroj.

Estas komprenibile, ke ĉi tiu tom rigida, sed nepre stilkonforma nobelo ne deziris interrilati kun la komunistaj kanajlaro de la kokejo. Nealjrebla, kun malŝate miranta trajto ĉirkaŭ la beko, li rigardis de malproksime, kiel la plumkovrita popolaĉo dispuŝis kaj interbatalis pro iom da elgraita kaj disĉutita furaĝo, aŭskultis, malgrable tuŝita, la senhontan klakadon, per kiu lu kokino anoncis la formeton de ovo kaj mezuris la rimarkinde vestitan doman virkokon, kiu alproksimiĝis malpaceme, de supre malsupren per rigardo tiom

glacia, ke ĉi tiu konsterniĝis kaj embarasite ŝajniĝis, kvazaŭ li estus serĉonta ion ĉirkaŭe sur la tero.

Sed finfine, eĉ memvolita izoliteco eŝkas dum longa daŭro netolereble. Ankaŭ la virnumido trovis, ke, kvankam interrilatado kun vulgara popolo ne estas dezirinda, tamen la proksimiĝo al la inaro de ĉi tiuj malaltaj sferoj, laŭ cirkonstancoj povas eŝki distre kaj gajige. Kaj tial oni post kelka tempo vidis lin, promenadi en frapanta intimeco kun kokino el la gento de „Hamburgaj Arĝent-makuletoj“, kiu surhavis belektan, nigra-blankan vestaĵon. Kvankam la kavalireca amiko evisis tedi sian elektitan amikino per tiaj pretendoj, per kiuj la impertinenta domkokviro amuzis la kokvirojn, li dum komuna furagserĉado tamen ne mangiĝis delikatajn komplezaĵojn. Li eĉ momenton ne hezitis, ekdefendi la estrinon de sia koro, kiam la multkolora virkokaĉo fine tamen permesis al si maldiskretajn intimaĵojn kontraŭ la amikino. Kun sia akrega voĉo, kiu sonis kvazaŭ: „He, vi ĉi tie!“, li alrapidegis la vulgaran rivalon kaj havigis al li, spite sian tremetantan koleton, kelkajn bone trafantajn bekhakojn. La el senrasa kokkanajlaro devenanta virkoko do efektive forkuris, malkuraĝa kaj nekutima je energia memdisciplino, por cedi estonte, kun respekto de ulo forte vangfrapita, la vojon al la sinjoro en delikate griza vesto. Venis gastoj, kaj kun ili venis la morto.

La virkoko kaj kelkaj maleminentalj kokinoj estis, orbrune rostitaj, kun rizo kaj fruktoj mangitataj, kaj anstataŭ la kolorama insidmortiĝo, aperis en la kokejo giganta, de la kapo ĝis la piedoj en malserena, funebroprofitanta nigraĵo vestita Langshan\*)-kokviro, kiu, devenante el nobela familio, ekposedis la regadon kun certa

memkomprenebleco. La virnumidon li komence ne atentis, ŝajnis ankaŭ ne havis iajn sentojn por la arĝentmakuleta kokino. Tial la du sinjoroj dum kelkaj tagoj, pretervidante unu la alian, ĉirkaŭradis pace en la ĝardeno.

Bedaŭre la flirtemo de la bela nigrablanka kokino estigis la plej malagrablan interokazon. Ĉu, ke ŝi pliŝatis la basan „kikerikon“ de la virkokego ol la tranĉantan sopranon de sia ĝisnuna amiko, ĉu, ke ŝi iumanlere ekmalkovris en si laŭnaturan inklino al forto kaj potencega membraro, — fakto estas, ke ŝi iumatene preskaŭ trudis sin al la Langshan-kokviro. Kaj ŝi sukcesis sen granda peno, direktigi al si lian bonplaĉon kaj eĉ pli ol tion.

Ĉi tion la perlorigita kavalliro neniel povis toleri, kaj tial okazis duelo, klan la kokejano ankoraŭ ne ĝisvivis. Homa interveno la ekĝenis tiun batalon, ke ĝi restis por tiel diri nedecidita. Sed tamen ne estis malfacile, ekkoni, ke la kompinta virnumido sen ĉi tiu enmikso estus venkita. La kontraŭulo elŝiris al li per „malalta kvarto“) unu el liaj belaj, ruĝaj vangpendaĵoj, ĉifontis ĝis-sange la koleton kaj disŝiris aĉige la elegantan vestaĵon. Lamante, sed kun teniĝo kaj digno, profunde ofendite, sed montrante eksteran indiferecon, la virnumido retiriĝis de la batalkamp.

De tiam li iradis sole por si kaj ekkonvulsis nur dolore, kiam la amatino, karese klukante, iretis de la flanko de la nigra antagonisto. Sed li ne plu estis la iama. Li malgrasiĝis, jam nur malmulte zorgis pri sia eksteraĵo kaj dormadis soleca kaj forlasita en la branĉoj de sambukarbusto, superverŝata de la luno per malvarma arĝento, malsekigata de la roso, indifereca kaj vivilaĉa. Li sentis froston en sia fadeniĝinta vestaĵo, tusetis, rifuzis la furaĝon.

\*) Paul Busson apartenas al la bonkonataj mode naj verkistoj de Aŭstrio. Lia preferata kampo estas nelonga rakonto kaj novelo, precipe el la loka Vien'a vivo, en kio li disvolvas grandan konon de l' priskribita medio kaj subtilan psihologian ensentigon. La romano „La historio pri Melchior Dronie“, aperinta en la pasinta jaro, estas konsiderata kiel lia plej bona verko. De pluraj liaj il okupas la postenon de redaktoro ĉe la grava Vienna ĵurnalo „Neues Wiener Tageblatt“. — Rim. de l' Trad.

\*) Kokspeco, devenanta el la montaro „Lang-shan“.

\*) Nomo de speciala sabrohako dum la skermo.

„La virnumido pereos. Ni mortpikos lin!“ Diris krudanima voĉo, kiam li foje ankaŭ dumtage frostose tremetante sidis sur sia branĉo. Li ridetis maldolĉe. Kaj la sekvinta mateno tiu kuŝis senviva sub la maljuna arbusto, tute super ŝultita per blankaj florŝteloj. Ĉar ankaŭ la floroj mortis je ĉi tiu tempo. Lia kolo estis tute malgrasiĝinta; la cikatro, kiun li ekhavis en la lasta batalo, sangis ankoraŭ lom.

Mi, kiu kunrigardis la tragedion de la komenco ĝis la fino, starigas al li ĉi tie malgrandan kaj paseman monumenton. Ĉar la diferenco inter la sortoj de homoj kaj bestoj ŝajnas al mi ne tre granda.

Kun permeso de la aŭtoro tradukita.  
 F. Zwach.

### MALRIĈA EN SPIRITO.

Teatraĵo en du aktoj kaj unu interakto.  
 Originale verkita de H. J. Bulthuis, L. K.  
 (7-a Daŭrigo.)

#### LASTA AKTO.


**Aktoraj kaj Scenej** kiel en la unua akto.  
 Estas la naŭa horo en la mateno.  
 La Patrino kaj Alberto sidas ankoraŭ ĉe la tablo, kiel je la fino de la unua akto.  
 Mallonga paŭzo, kiam la kutteno leviĝas; poste tre malrapide Alberto vekigaas, fine li levias la kapon kaj rigardas surprizite antaŭ sin kvazaŭ en sonĝo.

#### Unua sceno.

La Patrino, Alberto.

Alberto. Kie mi estas? Kio okazis? Ĉu mi dormis? (Li ekvidas la dormantan patrinon kaj





Zittau en Saksujo:

Rigardo sur la turojn de l' urbo kaj la montaron.

Ĝi evidentiĝis sian taŭgecon kaj valoron pro tio ke ĝi klopodas pri la plej urĝaj aferoj — sen-okupeco, domkonstruado kaj edukado; ankaŭ ĝi kontraŭstaras militadon. Estas miraklo, se tiu parilo post malmultaj jaroj ne prenos sur sin la kondukrimedojn de regado.

J. W. Leslie.

## Luzacia (Lausitz'a) Esperanto-Semajno en Zittau (2.—9. septembro 1923).

Rekomendinta kiel postkongresa vojaĝo estas vizito al la orientsaksa industri- kaj ĝarden-urbo Zittau, facile atingebla de Dresden per rapid-vagonaro en du horoj, de Görlitz kaj de Reichenberg (Ĉeĥoslovakio) en unu horo. La ĉi tiea Esperantistaro okazigos komence de septembro propagando-semajnon, kiu jam nun estas tre bone preparata kaj certe faros egan impreson je la loĝantaro. La efiko de nia propagando estas ankoraŭ pli granda, se ni estus vizitataj de eksterlandaj gesamideanoj.


La aranĝaĵo havos la nomon „Lausitzer Esperanto-Woche“ (Luzacia Esperanto-Semajno) kaj kadromos la 12-an jarrevenon de la fondiĝo de Zittau-a loka grupo de Germana Esperanto-Asocio. La programo estos jena:

1. sept.: Antaŭvespero, propaganda parolado.
2. „Malfermo de tutsemajna ekspozicio.
- 3.-7. „Ĉia propagando per gazetoj, flug-folioj, lumbildoj en kinejoj, afiŝoj ktp.
8. 12-a fondiĝ-festo, festbalo en „Etablissement Lindenhof“, krondemeto ĉe tomboj de mortintaj antaŭbatalantoj.
9. Koncerto de la urba orkestro antaŭ la ekspoziciejo, fermo de la ekspozicio, amika kunveno kaj finfest-vespero en hotelo „Augustin“.

Mondonaco kaj sendaĵojn por la ekspozicio ni akceptos dankeme.

Eksterurbaj kaj eksterlandaj Esperantistoj, kiuj vizitos nin dum tiu tempo, certe trovos multajn afablulojn inter la gesamideanoj de la urbo kaj ĉirkaŭaĵo, kiuj montras al ili la belegajn vidindaĵojn de la ĉirkaŭa montaro, pri kiuj skribi detale ĉi tie mankas la loko. Estu nur menciataj la ĉefaj sciindaĵoj.

Zittau, kiu nun havas 40000 loĝantojn kaj ĉirkaŭaĵon tre riĉan je grandaj vilaĝoj, estas fondita en 1255, kaj estis unue bohema urbo. En 17-a



Oybin apud Zittau: Oybin-monto kun rulno.

eksidas rekte sur sia seĝo.) Patrino! Ŝi ankaŭ dormas. Kiel lume estas! (Rigardas la horloĝon.) Kiu horo? (Surprizite.) Ĝi jam la naŭa! Sed tio estas neblas! (Terurite.) Dio, kio okazis ĉi tie? (Laŭte vokante.) Patrino! Patrino! (Iras al ŝi kaj skuas ŝin.) Patrino! Vekiĝu! — Kara ĉielo! Ĝi jam tiel malfrue, kaj je la tria mi devis refoje esti en la kazino! (Pli laŭte.) Patrino! Patrino! (Skuas ŝin pli forte.) Vekiĝu!

Patrino (vekigaŝ malrapide, levas la kapon kaj rigardas lin demande; poste ŝi diras subite): Kiu horo estas?

Alberto. Ĝi jam la naŭa. Kio do fariĝis? Kio okazis kun ni? Ni dormis, kaj je la tria mi devis esti returne en la kazino.

Patrino. Jes, je la tria.

Alberto. Sed komprenu do! Estas jam la naŭa!

Patrino. Kaj tro malfrue por reiri tien.

Alberto. Sed, patrino! Tio estas terura! Komprenu do, Huberto estas responde, lin oni ekzekutos, se mi ne revenos! Ho, kara ĉielo, tio eble jam okazis!

Patrino (terurite). Vi tamen diris, ke li volonte donus sian vivon por savi vin.

Alberto. Kion vi diras? Ha, vi —!

Patrino (terurite). Kompantu min, Alberto — mi ne scias — ne pripensu, kion mi faris.

Alberto. Kion vi faris? Vi do estas kulpa? Sed kion vi do faris? Ha, mi komprenas! La lakto estis tiel acida. Vi — Diru, kion vi enmiksis?

Patrino (levas al li la interfingritajn manojn). Ho, ne koleru kontraŭ mi, tion mi ne povus elporti!

Alberto (kolerante). Kion vi enmiksis?

Patrino (kiel antaŭe). Kelkajn gutojn el tiu botelo — —

jarcento ĝi aparteniĝis kun la tuta provinca Luza-cio, kies metropolo ĝi estas, al Saksujo. Ĝi devis multe suferi pro militoj, epidemioj kaj brulegoj kaj estis parte detruata dum la „7-jara milito“ de la prusoj.

Pro sia ĉefa industrio (teksado) Zittau estis ĉiam tre riĉa urbo, kaj ankoraŭ hodiaŭ ĝi posedas multajn belecaĵojn el sia mezepoka florado-tempo. Fortaj bastionoj rakontas al ni pri la bataladoj okazintaj pro la posedo de la urbo. Grandaj grenejoj, noblaj komercistaj domoj, belegaj preĝejoj, malnovaj putoj kaj artecaj portaloj sciligas nin ankoraŭ pri la iama potenco de la loĝantoj.

Sed ankaŭ la moderna tempo kreis multajn tre vidindaĵojn. Impojn bankojn, fleraj urbal kaj ŝtataj domoj, la krematorio, modernaj fabrikoj kaj belegaj privataj domoj mirigas nin dum la irado tra belaj kaj grandiozaj promenadoj, kiuj informas nin pri la progresinta ĝarden-kulturo de la urbo. Mi volas menci nur unu ekzemplon: la florhorloĝo. En du grandaj parkoj oni povas ĝui krom la koncertadoj de bonaj orkestroj ankaŭ la koncertadon de kantemaj birdoj. Sur silentaj vojoj la promenantoj admiras la belcon de la naturo, kiu tiel malavare volas feliĉigi la homojn.

Pri Zittau tio sufiĉe. Sed detale rakonti pri la ĉirkaŭaĵo estas ankoraŭ malpli eble ol pri la urbo, kaj el la longa vico de la vilaĝoj kaj vilaĝetoj ekzistantaj en ĉi tiu juvelujo de la naturo estu nur nomataj la kuraclokoj Jonsdorf kaj Oybin (la „saksa St. Maurice“).

Atingeblaj de Zittau per mallarĝa fervojo en 1/2 horo kaj piede en 1 1/2 horoj ili estas bonaj centroj por multege de ekskursoj, plejmulte agrablaj kaj sendanĝere entreprenablaj. Agrablaj vojoj kondukas sur ĉiujn montojn, de sur kiuj oni povas ĝui perspektivon en la belajn Sakslandon kaj apudon Bohemujon. Ombrumataj vojoj agrabligas al ni la viziton al la vidindaj sabloŝtonegoj, kiuj grandnombre estas trovitaj en la montaro kaj havas kelkfoje tre strangajn formojn, kiajn oni apenaŭ trovas aliloke en la mondo, ekzemple kiel kaliko, monahino, kovanta kokino, pordego, orgeno ktp.

Je malnovaj tempoj memorigas sur la Oybin-monto kaj aliaj lokoj rulnoj de monaĥejo kaj nobelrabistaj kasteloj. Artemulojn certe interesas la arbar-teatrejo en Oybin, kiu estas la plej granda en Germanujo kaj havas lokon por 7000 aŭskultantoj. Proksime de Zittau troviĝas ankoraŭ alia arbar-teatrejo en Sohland. Oybin, kies preĝejoj posedas belan ludsonorilaron, estas ankaŭ vintre tre vizitata kiel sportloko, same Jonsdorf.

Ho! 8-paĝa speciala numero de ET ne sufiĉas por detale priskribi la multajn belecaĵojn, kaj la bildoj aldonitaj ĉi tie estas ankaŭ nur malgranda nesufiĉa kolekto. Sed vidu min! Vizitu nin dum la „Luzacia Esperanto-Semajno“ aŭ kiam ajn vi volas. La fervora Esperantistaro de Zittau kaj ĉirkaŭaĵo ĉiam estas preta por akcepti kaj gvidi vin. Turnu vin al la ĉi-suba adreso, ĉiam vi estos bonvenigataj. Venu, vidu kaj miregu! Vi certe ne pentos!

Karl Knoll,

prezidanto de la Societo „Esperanto“  
Zittau (Saks.), Theodor-Körner-Allee 11

Postskribo: La Esperantistaro de Zittau aperigos komence de julio gvidlibron, kiu jam nun estas mendebila po ekzemplor 0,50 svis, franko por bonvalutuloj, kaj po 0,50 germ. marko X plusilombro por malbonvalutuloj. Aŝranko kunsendo.

## Mallongaj Esp. Scigoj.

Aŭstralo.

Propaganda vojaĝo de aŭstrala samideano.

La 25. 4. ges-oj Drummond el Melbourne forlasis Aŭstalion per ŝipo „Largs Bay“ por vojaĝi al la XV-a Univ. Kongreso en Nürnberg. Fine de junio ili alvenos en London. Restos il kelkajn semajnojn kaj poste vojaĝos al la eŭropa kontinento, kie ili vizitos diversajn landojn. S-o Dr. intencas en plejble multaj lokoj fari paroladojn lumbilde ilustritajn pri „Aŭstralo, la sunbrila

Alberto (kuras al la ŝranko, elprenas la boteleton). Ha, mi vidas! Dormigilon vi enmiksis, kiun vi uzis por Johano, kiam li havis la cerboekskuan! Sed, patrino, tio estas terura, tio estas abomena, tio estas nepardonebla! (Li ŝetas la boteleton teren, kie ĝi dispecetiĝas; pli kolere: Patrino, vi ne komprenas, kion vi faris! Patrino (kurbiĝas pro teruro). Mi volis savi vin —

Alberto. Savi min? Kaj vi mortigis mian amikon! Ĉu vi scias, patrino, kion tio signifas? Tio estas — perfida mortigo!

Patrino (kiel antaŭe). Perfida —?

Alberto. Jes, perfida mortigo. Huberto fidis min. Mi juris reveni, kaj jen! Ho, sankta Dio, kion mi faros? Kion diros miaj kamaradoj? Ili scias, ke mi forkuris pro vi kaj pro Johano, kaj ion tian ili opinias natura, pardonebla. Sed nun ili akuzos min duoble kaj kun rajto. Mi ne nur fariĝis malinda mortiginto, sed samtempe malnobia jurrompinto kaj abomeninda malkuraĝulo. Sed mi pruvos, ke mi ne estas tia! Mi pruvos, ke mi ne forkuris timante la morton. Mi reiros al la kazino kaj ekkrios laŭte, tiel laŭte, ke ĉiuj min aŭdos: Jen mi estas! Mortpafu min, kaj ĉio estas finita! — Tiam ili komprenos, ke mi ne estas perfidulo aŭ jurrompinto aŭ malkuraĝulo, kaj tiam ili ĉiuj pardonos al mi la mortigon kontraŭ Huberto.

Patrino (falas sur la genuojn antaŭ li). Ho, pardonu, pardonu min! Pripensu, ke mi ĝin faris pro via frato! Ne reiru al la urbo — al la kazino: estas la tro malfrue! Kio fariĝis, ne refariĝos. Prefere forkuru!

Alberto. Jes, mi forkuros — al la kazino — kaj eĉ tuj! (Li iras al la fajroloko kaj subite ekhaltas) Miaj vestoj!

Patrino (kun ekkrio de teruro). Ha!

lando de progreso, pri la nova kaj bela „mondo de la sudo“. Per tio li volas fari propagandon per Esperanto kaj prui al la aŭstrala ĵurnalistaro, ke Esperanto estas vere utila kaj diavastigita. Grupsekretarioj interesataj skribu tuj al W. J. Drummond, British Esperanto Association, 17 Hart Street, London W. C. 1.

Ĉeĥoslovakujo.

La Esperantistoj de Mor. Ostrava (Mähr.-Ostrau) kaj ĉirkaŭaĵo intencas viziti la industriar kaj melian ekspozicion en Vítkovice, Mor. Ostrava, komune, por propagandi tiamanere nian lingvon kaj invitas ankaŭ fremdajn samideanojn.

Programo por 8. Julio, la elektita tago: 8—10 h. kunveno de Esperantistoj en hotelo Nacional; 10—12 h. rigardo de la urbo; 12—15 h. laŭvole komuna iaĝmanĝo; 15,30 komuna marŝo en la ekspozicion.

Informojn donas s-o J. Janečka kaj Alois Rossmannit, Mähr. Ostrau, Denlaplatz 2.

Danzig.

Dum la Danziga Postkongreso oni prezentos en Zoppo la opereton „Brüderlein fein“ en Esperanto.

Franĉujo.

Al „Verda Kato“. — Korekto.

En n-o 157 ni publikigis vian „malaŭdado“ pri la vorsaĵo de s-o Legrand aperinta en nia aprila „Revuo“. Kiel s-o L. komunikas al ni per letero de 9. 5., li erare skribis „stutoj“ anstataŭ „struoj“ (speco de birdoj). La redaktoro, supozante ke s-o L. trouzis liberecon permesitan al poeto, aidonis klarigan noteton: stutoj=ĉevalinoj. Oni korektu ankaŭ en la sama poemo: „fruktoj oraj“ anst. „fruktoj ovaĵ“.

Perpignan. Kursoj kun novaj lernantoj daŭras ĉe Laborborso. Nova adreso de la grupo: 5, rue de la Savonnerie.

Germanujo.

La budĝeto de Esp. Instituto por la Germ. Regno por la tempo de 1. 4. 22 ĝis 31. 3. 23 montras elpezon de 769475,11 mk. kaj enspezon de 758602,40 mk. La antaŭbudĝeto por la nova jaro montras elpezon de 1800000 mk. kaj provizoran deficiton de 1800000 mk., kiun oni esperas egaligi per monsubtenoj de samideanoj kaj amikoj. Estas dezirinde, por la graveco de la Instituto, ke la subtenoj alvenu multnombre kaj riĉe, ankaŭ el eksterlando. Adreso: Esperanto Instituto por la Germana Regno, direktoro Dr. Dietterle, Leipzig-Schl. Seumestr. 10.

Laŭ la grupaj raportoj en la laste ricevitaj numeroj de „Germ. Esperantisto“ la Esp. movado en Germanlando iom stabiligis, t. e. novaj kursoj estas maloftaj, kvankam oni tamen supozu, ke la antaŭstaranta kongreso en Nürnberg plivigligus la agadon de la grupoj. Ŝajnas, ke la mizera politika kaj ekonomia situacio de la kongreslando kaŭzas tion. GEK konsistas nuntempe el 184 grupoj.

Pli vigla movado estas inter laboristoj. La juna numero de „Arbeiter-Esperantist“ enhavas scigolon pri novaj kursoj en Glauchau, Laichlingen, Ludwigshafen, Mannheim, Miltweida, Nürnberg, Oberlungwitz kaj Zirndorf.

Oficiala publika Esperanto-Informejo en Plauen (Vogtlando) Germanujo.

La policejo starigis oficialan publikan Esperanto-informeton en Plauen (Vogtlando, Saksa Germanujo). La informejo troviĝas en la urbdomo ĉambro 425. Tie estas prescipe por eksterlandaj samideanoj el Esperantujo bona okazo peti ĉiujn informojn. Travojaĝantaj Esperantistoj uzu la novan arangan kaj vizitu la samideanojn en Plauen!

Italujo.

Itala Interregiona kunveno en Soave.

Dimanĉon la 27. 5 okazis la anoncita interregiona kunveno en Soave. La pitoreska mezepoka urbo estis tute ornamita per flagoj honore de l' Esperantistoj gastoj. Ĉe l' atacadomo atendis la knabaro de l' urbernejoj kaj aŭtoritatoj. Urbeestro akceptis solene en sia sidejo. En aparta ĉambrego okazis kunsido. Prezidis Adv. V. a. o. n. a. prez. de Itala Esp. Fed. Parolla estroj de grupoj en Caldiero, Cologna V., Colognola, Mantova, S. Ambrogio, S. Bonifacio, S. Michele, Padova, Verona, Venezia. Dankis por Soave Prof. Conti kaj f-ino Panato. Fine D-ro Toschi, sekr. de IEF, elparolis oficialan prelegon pri valoro kaj signifo de Esperanto en nuntempa historia momento. Lunĉo estis poste regalata de loka grupo.

La kunvenantoj iris are meŝi florojn ĉe la monumento al militmortintoj kaj fine vizitis la faman bele konservitan kastelon gvidate de fama pentristo s-o Mattielli kaj de Prof. Conti. En kastela korto okazis komuna sakmanĝo. Kantoj kaj paroloj fermis la belan gajan kaj utilan rendezvoun.

Jugoslavio.

En Split la Esp. movado tre bone enradikiĝis. La ĵurnalo „Jugoslavenski Narod“ ĉiudimante enhavas Esp. anglon, kaj la ĵurnalo „Novo Doba“ ofte publikigas notojn pri Esp. Multaj ĉeĥoslovakaj samideanoj anoncia sian viziton por la venonta somero. F-ino Ireland el Brighton (Anglio) vizitis nian landon kaj ĉie renkontis afablajn gesamideanojn. D-ro Iivo el Fukuvka promesis sian viziton. En Dubrovnik kelkaj studentoj decidis plivigligi la movadon kaj malfermos komence de junio

Alberto. Miaj vestoj! Kie vi kaŝis miajn vestojn? Redonu ilin tuj! Eble mi povos ankoraŭ savi mian amikon. Eble oni prokrastis lian ekzekuton. Miaj vestoj!!

Patrino (rigardas kun kreskanta teruro al la seĝo, sur kiu antaŭe pendis la soldataj vestoj). Granda Dio, kie ili estas? Kaj kie estas Johano? (Kuras al la benko.) Fort! (Ŝi kuras el la ĉambro tra la maldekstra pordo kaj revenas tuj.) Kie li estas? (Ekvidas liajn vestojn, kuŝantajn antaŭ la fajroloko.) Dio potenco, kompantu min! (Ŝi svenas kaj falas sur la vestojn.)

Alberto (portas ŝin sur la benkon kaj genufleksas antaŭ ĝi; atendas momenton).

Patrino (rekonsciĝas). Kompatemala ĉielo! Ho, Alberto — ili mortpafis lin!

Alberto. Kiun?

Patrino. Vian kompatindan fratton. Ho Dio, Dio!

Alberto. Vi deliras, patrino. Rekonsciĝu kaj pripensu!

Patrino (ekploras). Ho, mi ne deliras. Oni mortpafis lin, mian malfeliĉan knabon —

Alberto. Sed, patrino, vi ne scias, kion vi diras. Pripensu do!


Patrino. Ne estas bezone, ke mi pripensu. Alberto. Sed mi tute ne komprenas ĉion tion. Parolu do!

Patrino. Li surmetis vian uniformon. Li iris al la kazino, kaj tie oni mortpafis lin. Kaj mi estas kulpa!

Alberto. Sed klarigu do! Kial li farus tion? Mi komprenas nenion el ĉio tio.

Patrino (konsternite pro malespero iras al sia seĝo, ekvidas la malfermitan biblion). Jen! Tie estas la biblio! Li malfermis ĝin je la sama loko —

Alberto. Je kiu loko?



Zittau: Lageto en Weinau-parko.

kurson. La ĉirkaŭaĵo, kiu nun estas multe vizitata de bangastoj, montras ankaŭ intereson por Esperanto.

Laŭ statistiko gvidata de s-o Rupčić Esperantistoj ekzistas en 57 lokoj de Dalmacio. Oni diligente lernas la lingvon eĉ en mizeraj vilaĝoj malproksimaj de la urboj. UEA havas en Dalmacio 4 delegitojn (Pospije, Split, Trpanj kaj Vrgorac).

Por montri la gastamecon kaj fervoron de la ĉi tieaj samideanoj, sufiĉas diri, ke ĵus aŭvenis en Split avisa junulo J. Maelli, perinde survoje monuon kaj disŝirinte vestojn kaj ŝuojn Esperantistoj lin gastigis, satigis, vestis kaj serĉas por li okupon.

Japanujo.

Amaki. Kurso kun 150 p. okazis de 19.—28. 5. ĉe Asakura Liceo.

Hiroŝima. Prof. Saito gvidas kurson. Kioto La 5. 5. angla komercisto s ano Stanton Brown vizitis ĉi tieajn s-anojn.

Kobe. Vakana Komerca Industri Liceo enkondukis Esperanton; kurso daŭras de aprilo ĝis oktobro. — En Kobe Hykera Club (ekskursa klubo de junaj gefremdlandanoj, t. a. anglaj, avisoj kaj rusoj) s-o Okudaira gvidas kurson.

Soule (Kejjo). Kurso ĉe Teramači Elementa Lernejo en Jinso. — La 16. 5. parolado de s-o Oojama antaŭ 800 lernantinoj de unua Kejjo knabina Liceo.

Tokio. 23. 5. okazis adiaŭa festeno por Dr. Ramstedt, kiu revojaĝis al Finnlando, kaj por s-oj Sono kaj Okamoto, kiuj vojaĝos Eŭropon por studi. — 26.—31. 5. okazis kurso kun 450 personoj en la halo de Imperia Eduka Asocio. Kvankam tiu kurso estis rapidkurso, la membro de la partoprenintoj estas nekutima kaj prezentas rekordon ĝis nun ne atingitan.

Ruslando.

Petrograd. 15. 5. en Centra Klubo de Fervojistoj s-o M. Valentinov faris sukcesan raporton pri Esp., kiun ĉeestis pli ol 250 p. Kursoj komenciĝis.

Moskva. Kvara Tutruslanda Kongreso Esperantista okazos 19.—25. 7. en Moskva.

## IREKO.

Internacia Rejna Karavano.

Aliĝoj. Alvenis aliĝoj el plej diversaj landoj, tiel ke la karavano fariĝos vere internacia. Ĝojige estas, ke ankaŭ francoj ne lasas deteni sin de la partopreno.

Alveturo. Ne estas sufiĉe konate, ke la alveturo al Koblenz de norda kaj okcidenta Eŭropo povas okazi ankaŭ tra Köln (Kolonjo). Por prizorgo de noktloĝejo en Köln oni anoncu sin ĉe Revelo, Hohestr. 26, Köln.

Frankfurt a. M. La Frankfurta Esperantista Grupo afable aranĝos viziton al vidindaĵoj de la urbo por la Irekanoj.

Antaŭaj komunikaĵoj troviĝas en la n-oj 129 kaj 136 de ET.

Adreso: Esperanto-Grupo, Florinsmarkt 7a I, Koblenz, Germanujo. Esperanto Grupo de Koblenz.



Jonsdorf apud Zittau: Lausche-monto.

Patrino. Je la loko, klun mi devis legi al ti. Alberto (sidiĝas sur la alia seĝo ĉe la tablo, rigardas al la biblio kaj poste al sia patrino). Patrino. Li imagis, ke li eniros la ĉielon, kiam li estos mortinta. La tutan vesperon li parolis pri tio.

Alberto. Lin oni tamen ne ekzekutos. Oni ja rimarkos, ke li ne estas la vera ekzekutoto.

Patrino. Ho ve! Tion ili ne rimarkos. Vi estas tiel simila unu la alia.

Alberto. Sed liaj blankaj haroj — — Huberto tuj rimarkos —

Patrino. La ĉapo kaŝas liajn harojn.

Alberto. Kio ajn estu kaj okazu, mi ne povas resti tie ĉi pli longe. Eble mi povos savi lin.

(Milde.) Pardonu al mi, patrino, ke mi tiel eksplodis kontraŭ vi.

(Ambaŭ ekstaras kaj ĉirkaŭbrakas unu la alian; poste la Patrino kaŝas la vizaĝon sur lia brusto, kaj Alberto karesas ŝian kapon.)

Paŭzeto. (Daŭrigota.)

## Reĝo estas mi majesta...

Reĝo estas mi majesta,  
Kun potenco granda,  
Granda estas lando mia,  
Vasta, senlimranda,  
Granda estas la armeo  
Kaj la kron' — fascina...  
Reĝo estas mi majesta,  
Reĝ' de kor' knabina...  
Eta koro ŝia estas  
Por mi vasta lando,  
Tamen min ĝi nur entenas  
Kvankam sen limranda...  
La kisetoj dolĉe-dolĉaj  
Estas milituloj,  
Kaj fascina mia koro —  
Ŝiaj la okuloj!..

Verkis originale  
Izrael Lejzerowicz.





Oybin apud Zittau!  
La preĝejo.

## Oficialaj komunikoj de „La Estonto Estas Nia“.

Fesikunveno kaj laborkunsido en „Hotelo Europe“, Utreĥto, 8. jul. 23.

Tagordo:

10<sup>1/2</sup>—12. 1. Malfermo per la L. E. N.-a prezidanto. 2. Saluto de la grupo. 3. Protokolo de la antaŭa kunveno. 4. Elekti de delegito kaj vicdelegito al la Universala Esp.

Kongreso. 5. Komunikoj rilate „Esp. Triumfonta“. 6. Fiksado de dato kaj loko por la venonta kunveno. 7. Ronddemando. 8. Fermo de la laborkunsido.

12—1. Paŭzo. La partoprenantoj laŭvole povos lunchi en la sama hotelo (l. 1.50\*).

1—6. Vizito per elektra tramo al la nova parko „Ooginal“, kie estos mallonga okazo por refreŝiĝo. Poste vizito al la „rozareto“ en Wilhelmina-parko.

6—7<sup>1/2</sup>. Komuna tagmanĝo en „l'Europe“. Libervola partoprenado; kosto: po f. 3.— por persono\*).

Post 7<sup>1/2</sup>. Deklamado, kantado, muziko ktp. S-o de Beus estas fama sorĉaristo. Li pretigis jam sian programon.

Partoprenantoj sendu la monon por partoprenado (po f. 1.— por persono, i. a. por la tramveturado) al s-o W. Beaten, Oude Gracht 276, Utreĥto (ĝirokonto 90254) prefere antaŭ 25. junio.

Tiuj, kiuj jam paginte ne povas veni, povos retrorecevi sian monon, se la scigoj pri illa neveno estos ricevita de s-o Beaten antaŭ la 8. julio.

La Utreĥta Komitato klopodis prezenti allogan programon por la festo-ago.

Ke granda aro da partoprenantoj montru, ke ĝi sukcesis.

La 1-a Sekretario.  
J. v. d. Velde.

\* Estas la ordinara prezo en tiu ĉi hotelo. Tiuj, kiuj intencas partopreni en la manĝadoj, bonvolu acigi tion al s-o Beaten, por ke la hotelestro zorgu por sufiĉa kvanto kaj kvalito.

## Literaturo.

Faŭst.

(4-a daŭrigo.)

Per la sceno arbaro kaj kaverno Goethe interrompis la Grenjo-tragedion kaj daŭrigis la scenon agantan pri la terspirito. Post momentoj de alta feliĉo Paŭst preĝas al la potenco titano. Malfacile komprenbla ŝajnas la sceno; en la fragmento ĝi troviĝis aliloko. El la agado de la dramo ni scias, ke Faŭst ĉesigis subite sian interrilaton kun Margareto, ĉar li ne volis veki la floron. Por ŝi estis gravaĵo, kio signifis epa epizodo por li; ni do komprenu la scenon de l' sceno ne el la fablo mem, sed el la vivo de l' poeto. Ĝi estas spuglo de l' animstato de Goethe, kiam li restadis en Italujo. Tie liaj studoj pri la naturscienco igis lin solvi la enigmon de l' ekkono de la evoluoteorio. Li senŝeligis la kernon kaj trovis la doktrinon de l' unueco. Ĉiuj demandoj lin turmentintaj trovis solvon kaj respondojn; lia klasikismo plenumiĝis. Tiamaniere ni nun komprenas la tri ĉefpartojn de l' monologo en ĉi tiu sceno: la faŭsteca sopirego al la naturo, la plenumiĝo kaj la klasikismo. La kunulo, kiun Goethe mencias fine de l' monologo, estas la demono vipanta lian sangon kaj terenfaliganta la titanon per la katenoj de l' erotiko.

La nun sekvantaj ses scenoj formas la kernon de l' tragedio; ili estas kvazaŭ pentraĵoj animaj montrantaj ion preskaŭ sanktan. Margareto ŝpinante kantas malgaje: Estas for trankvil', Korpremas pez'; Revenas la pac' je Nenia prez'. Kie mankas li, Jen tomb' por mi, Min nauzas mond' Kaj huanu rond'.

Trifoje ŝi ripetis la unuan strofon de l' kanto Forpuŝite el sia mondo trankvila, Grenjo suferas ege, sopire serĉante la koramaton. Ni sentas, ke la agado estas kondukanta al katastrofo. — En la dialogo inter Faŭst kaj Grenjo en la ĝardeno de Mario pri religio — Faŭst, ano de l' doktrino de Spinoza (Panteismo) kaj Margareto pia kredantino laŭ religio primitiva —, Goethe memoris la dialogon en la parohela ĝardeno en Seseheim inter ŝi kaj Friederike; jen la faŭsteca homo luktante ĉirkaŭprenanta la eternon, la veron, jen estaĵo el malgranda mondo ortodoksa.

Goethe ne mencias la falon de Grenjo; neniu vorto nin ŝokas, kaj tamen ni scias la okazintaĵon. Per eksterordinara delikateco li pritraktas la embarasan aferon en la sceno „Ce l' Puto“. Elinjo, burĝa knabino iom potolema, atengigas Grenjon pri la konsekvencoj de tio, kion ŝi pekaris; la turmentinta Grenjo petegas helpon antaŭ porpreĝa bildo de la *Mater dolorosa*.

Grenjo: Ho! savu min de hont' kaj morto!  
Ha kluu,  
Dolorulino,  
Favore vin al mia sorto!

Facile komprenbla estas la nokta sceno antaŭ la pordo de Margareto. La reveninta Valentino, frato de Margareto, kiu ĉiam glorie laŭdis la ĉastecon de sia fratino, ekscias la honton kaj postulas vengon. Skermante kun Faŭsto, kiun Meŝto subtenas, li mortas.

Ne plu delikataj estas la paroloj de Faŭst; li tute perdis la konscion pri sia agado. Goethe ĉerpis la cinikan logkanton de Meŝto el Hamleto, de Shakespeare (Kanto de Ofelia). Efektive aganta estas nur la sceno de l' mortigo de Valentino kaj ties malbeno; la poeto citas la ceteron nur skize.

Senhalte la demono antaŭdenpelas Grenjon, t. e. la malbona konscienco riproĉadas la viktimon de l' tragedio. Bone sonadas la orgeno frapante superforie la pekulilon, kiu svanante terenfalas. Finiĝas la granda sceno.

Sekvas la „Walpurgisnokto“. (Vidu la noton de l' tradukinto en la libro mem, p. 126.) La anatemo (ekzildonado) kaŭzita pro la murdo devigas Faŭston kaj Meŝton forkuri. Goethe furkurigas ilin al la Harzmontaro (meza Germanujo), kie la aĉaj sorĉistinoj festenas la Walpurgisnokton (30-an de aprilo). La interna evoluo de l' dramo rekompenciĝas. Malsukcesis la intenco de Meŝto plene kontentigi Faŭston; la Valentiusceno ne donis rezulton. Pro tio li ekuzas pli fortan rimedon gvidante lin en la plej profundan misteron satanecan. Majstre Goethe sukcesis kunigi la lastan parton de l' Grenjoitragedio kaj ĉi tiun sorĉistan nokton, unu el la plej emociantaj scenoj de l' dramo kaj paralelaj al Inferno de Dante („Divina Comedia“). Tute malsama estas la perceptoj de ambaŭ poetoj; jen la organizanta kaj skemiganta agmaniero de l' italo, jen la luktado de l' germano enpenetranta en la radikon de l' problemoj.

En nokto malluma Faŭst kaj Meŝto supreniras la „Brocken“ (monto); vaglumo iliin gvidas. Skizante la naturon Goethe rakontas la impresojn de iama vojaĝo al

ĉi tiu montaro. Galopante kaj rajdante sur balailoj florcristinoj ĉirkaŭflugas la supron. Duonsorĉistinoj plendante vokas supren; estas la senkaraktaraj estaĵoj konantaj nek bonon nek malbonon kaj kondamnataj je eterna duoneco. Goethe trafe ilin karakterizas. Nepe Faŭst volas atingi la montpinton; lia titanismo lin antaŭdenpuŝas. Meŝto montras al li pli trankvilan lokon, kie viraĉoj dancas, klonodante logi lin al amaveturado. Dancas Faŭsto, sed subite li paliĝante forkuras el la brakoj de la delogulino. Spiite li vidas Grenjon, la murdistinon de lia infano; kvazaŭ el la subkonscio venas la penso, ke ankaŭ li faris Margareton tia sorĉistino. Timigite li ilustras:

Faŭsto: Ĉu Meŝt', vi vidas  
Infanon palan, belan malproksime sola?  
Nur ŝove ŝi formalrapidas,  
Kun piedoj maldiaj pašas izola.

Aspektas, ha, konfesu mi,  
Al bona Gref' simila ŝi.

Mefisto: Ho lasu ŝin! Inkubas bild' fiktilva.  
